

HOMARANE

kajero en esperanto pri socio, filozofio, religio

**La Chaux-de-Fonds,
17-21 aŭgusto 2009**



**Aktoj
de la unua
Simpozio pri
Homaranismo
en KCE**

jaro 1

numero 1

redaktoro: Bertil Nilsson
eldonas Kooperativo de Literatura Foiro

HOMARANE

kajero en esperanto pri socio, filozofio, religio

aperofteco: (duon)jara

jaro 1 – numero 1 – januaro 2010

ISSN 1663-8484

redaktoro: Bertil Nilsson

teknika redaktoro: Bengt Olof Åradsson

kovrilo: Perla Martinelli, rolfo

posedas, eldonas, administras: LF-koop

redaktejo: Biskop Brasks gränd 25, SE-176 76 Järfälla, Svedio

<homarane@esperantio.net>

administrejo: LF-koop, cp 928, CH-2301 La Chaux-de-Fonds, Svislando

<lf-koop@esperantio.net>

mendebla pere de la agentoj kaj distribuantoj de LF-koop

unu ekzemplero: 18,- EUR

en la kovrilo:

la plej bela sinagogo kaj la plej bela framasona sidejo

en la tuta Svislando situas en La Chaux-de-Fonds:

koran dankon al iliaj responsuloj

kiuj akceptis la simpozianojn en akompana kaj klariga vizito



Enhavo

Artikoloj

HOMARANISMO 1914 - 1917

Francisko DEGOUL 9

L.L. ZAMENHOF KAJ T.G. MASARYK:

DIVERSECOJ KAJ SIMILECOJ PRI RELIGIO, NACIECOJ KAJ INTERNACIIISMO

Carlo MINNAJA 23

KIEL PERCEPTI LA ZAMENHOFAN HOMARANISMON?

Christer KISELMAN 41

ZAMENHOF. LA FALIGANTO DE MUROJ NACII SMAJ:

DE LA NASKIĜO DE CIONISMO ĜIS SOLVO HOMARANISMA DE LA
PALESTINA PROBLEMO

Raymond J.L. BRISEBOIS 75

INTER CIONISMO KAJ HOMARANISMO:

EDMOND PRIVAT KAJ LA PALESTINA DEMANDO

Perla MARTINELLI 89

DE 1901 AL 2001:

LA HOMARANISMO DE ZAMENHOF, LA SENNACIIISMO DE LANTI, LA SPIRITA
SINKRETISMO DE PRIVAT, LA RAŬMISMO DE LA ESPERANTA CIVITO

Giorgio SILFER 103

LA KAŜITA PENSO DE ZAMENHOF

Walter ŜELAZNY 109

POSTPAROLO – PRI HOMARANISMO KAJ LA FAMILIO	
Zofia BANET-FORNALOWA	123
DEMANDOJ PRI HOMARANISMO	
Armando ZECCHIN	135
DE ZAMENHOF ĜIS GANDHI	
Henri MASSON	149
MAZZINI, GARIBALDI, ZAMENHOF	
Paolo PENACCHIO	161
EKDE KOMENIO AL ZAMENHOF KAJ OBAMA	
Jaroslav KARHAN	181
ZAMENHOF KAJ FRAMASONISMO	
Davide ASTORI	185
HILELO, LA UNUA HOMARANO	
André CHERPILLOD	193

Librobreto

Der Glaube und die heiligen Schriften der Inder, de Walther Eidlitz..	207
La Tria Testamento - Livets Bog 1, de Martinus Thomsen.	208
Universala Deklaracio pri la Lingvaj Rajtoj.	209
Biogramoj	211

DAVIDE ASTORI
Lingvo Internacia



Davide ASTORI

Zamenhof kaj framasonismo

Estas jam longjara la demando pri la rilatoj inter Zamenhof kaj framasonismo. Kvankam sendubaj estas la kulturaj elanoj kiuj ŝajnas ligi liajn etike-filozofiajn meditojn (homaranismon unua-vice¹) al tiu pli ĝenerala humo framasona kiu profunde influis la socian kaj kulturan historion de la XIX jarcento², ne ekzistas pruvoj certaj pri lia adeptiĝo³; nur kelkaj spuroj kaŝitaj inter la faktoj rilataj la historion de praesperanto kaj la vivon de ĝia iniciatinto, kiujn ni ekkonsideros tuj sekve.

Unua kaj plej interesa punkto analizenda pri la rilato de Zamenhof kun framasonismo estas trovebla en la fortaj similecoj inter *Dogmoj de Hilelismo*⁴ kaj *Old Charges* (Antikvaj Devoj) de Anderson⁵, fundamentaj tekstoj de la framasona institucio, kiujn ni klopodos legi kompare. Jam el la unuaj linioj de la *Preamblo*⁶ de la Dogmoj surfaciĝas tuj ŝlosilaj temoj, kies kongruenco kun la framasonaj valoroj estas nekontestebla, same kiel ne estas kontesteblaj la gravaj leksikaj similecoj. Ekzemple ni legas, paralele al la universalisma kaj etika elano zamenhofa, kelkajn elĉerpaĵojn el *Identeco de la Granda Oriento de Italio*⁷:

La Framasonaro de la Granda Oriento de Italio de Palaco Giustiniani estas inica Ordeno kies membroj laboras por la morala kaj spirita altigo de la homo kaj de la homa familio. La naturo de la Framasonaro kaj de ĝiaj institucioj estas humaneca, filozofia kaj morala. Ĝi lasas al ĉiuj siaj membroj la individuan elekton kaj respondecon de la propraj religiaj opinioj, sed neniu povas esti akceptita kiel framasono se li ne deklaris antaŭe ke li kredas en la Plejsupera Estulo (...) Ĝi stimulas la toleremon, praktikas la justecon, helpas la bezonulojn, stimulas la amon al la proksimulo kaj serĉas ĉion kio povas ligi inter si la homojn kaj la popolojn, por pli bone kontribui al la realigo de la universala frateco. La Framasonaro proklamas la altan valoron de la unuopa homa persono kaj agnoskas por ĉiu homo la rajton kontribui aŭtonome al la serĉado de la Vero. Ĝi inicas nur bonmorajn homojn, sen distingoj de raso aŭ de socia tavolo (...).

Alia signo de kongruenco kun la zamenhofa spirito (specife se temas pri la spiriteco de natura religio) estas la unua el la *Antikvaj Devoj* de Anderson:

I. Pri Dio kaj la religio. Framasono estas pro sia stato devigata obei la moralan leĝon; kaj se li trafe komprenas la Arton li neniam estos stulta ateisto nek malreligia libertino. Sed, kvankam en la malnovaj tempoj la Framasonoj estis devigataj en ĉiu lando aparteni al la religio de tiu Lando aŭ Nacio, kiu ajn ĝi estus, nuntempe oni tamen opinias pli konvene devigi ilin nur al tiu Religio pri kiu ĉiuj homoj konsentas, permesante al ili iliajn apartajn opiniojn: nome esti homoj bonaj kaj sinceraj aŭ homoj de honoro kaj honesto, kiaj ajn estus la nomoj aŭ la konvinkoj kiuj ilin distingas; tial la Framasonaro fariĝas Centro de Unuiĝo, kaj la ilo por cementi sinceran amikecon inter personoj kiuj [alimaniere] estus restintaj por ĉiam malproksimaj (...).

En la sekva alineo, el la *Preamblo* al la *Dogmoj de Hilelismo*:

La mirinda sukceso de la Bulonja kongreso konvinkis la iniciatorojn de la hilelismo, ke absoluta justeco, egaleco kaj

frateco inter la popoloj en la praktiko estas plene ebla. Tial ili decidis uzi la plej proksiman tutmondan kongreson de la esperantistoj en Ĝenevo en Septembro 1906, por proponi al ĉiuj amikoj de interpopola justeco unuiĝi en apartan grupon, kiu inter la amikoj de internacia lingvo prezentus apartan sekcion (...).

Probable estas komprenebla aludo al la Framasona Ligo, asocio paraframasona fondita en 1905 ene de la unua Universala Kongreso⁸, poste pligrandigita en Berno en 1913, en kies UK okazis tuta seanco en esperanto.⁹

La deka dogmo specife eniras la kernon de la religia penso de Zamenhof, per nepra resendo al la antikva klerisma tradicio de la natura religio, kiu de Locke evoluis ĝis la atingo de la nuntempa pleneco de ĝia valoro. Tia sento – sento pli ol teoria rezonado – de laike-natura religieco revenas ateste en la fragmento plej ofte citita kiel “vortoj de lasta konfeso”, kiu poezie senvualigas eble la plej intiman proksimecon de Zamenhof al la transcenda nivelo.¹⁰

La koncepto kaj valoro de la “templo” indikita en la Dogmoj XI kaj XII, havas sian precizan kongruon almenaŭ en la tria devo laŭ Anderson, kiu tiel tekstas:

III. Pri la Loĝioj. Loĝio estas loko kie la Framasonoj kunvenas kaj agas: tial tiu asembleo, aŭ taŭĝe organizita societo de Framasonoj, nomiĝas Loĝio, kaj ĉiu frato devos aparteni al unu el ili kaj konformiĝi al ĝiaj normoj kaj ĝeneralaj reguloj.

En la tuta verkaro de Zamenhof evidentiĝas aludoj kaj pruntoj el la doktrinoj framasonaj, unuavice en kampo filozofi-politika¹¹; en la programa parolado de la unua Universala Kongreso, ekzemple, kernas la koncepto de “granda homa familio”, kiu fine kunvenas en momento de granda spiriteco (*Sankta estas por ni la hodiaŭa tago*) por lanĉi universalan planon de libereco, egaleco kaj frateco: *ni ĉiuj staras sur fundamento neŭtrala, ni ĉiuj estas plene egalrajtaj; ni ĉiuj sentas nin kiel membroj de unu nacio, kiel membroj de unu familio (...).* La ideo de “ora epoko”, tute reakirinda, enradikiĝas en la antikva mito de la Babela turo, kies konstruinto, Nimrod, ne hazarde estas citita en pli ol unu punkto de la framasonaj ritoj, ekde la rito de transiro al la grado

“kompano”, ĝis la rekta cito en la dudekunua grado (Prusa Kavaliro aŭ Noaida Patriarko aŭ Libera Juĝisto).

La formulo kiu malfermas la lastan paragrafon de la bulonja parolado (*Baldaŭ komenciĝos la laboroj de nia kongreso, dediĉita al la vera fratiĝo de la homaro*) klare eĥas framasonenece, laŭ leksiko kaj formo: unuflanke la termino “laboro”, aliflanke la rita alvoko “al la gloro de GADU [Granda Arkitekto De l' Universo] kaj por la bono de la homaro”.

Framasonaj spuroj estas rimarkeblaj ankaŭ en la programaj poemoj.

En *Preĝo sub la Verda Standardo* oni perceptas fortajn aludojn al la framasona penso: en la unua strofo ŝvebas la koncepto de GADU, fonda kaj nepra temo de la framasonismo¹²; poste, en la dense simboleca lasta strofo, cenzurita ĉe la unua UK, kaj konsiderata tiel esotera, en etimologia senco, ke oni eĉ ne publikigis ĝin en la Fundamenta Krestomatio, rememorigas ne hazarde la framasonan *Ringparabel* de Lessing aŭ ankaŭ tutan poezian produktadon, kie *The Mother Lodge* de Kipling estas ekzemplo inter la plej klaraj.

La Espero, la esperantista himno, prezentas multajn trajtojn de inica karaktero: la “nova sento”, tiu deziro de palingenezo kiu plibonigos la mondon per la disvastigo de la homaj kaj kulturaj idealoj karakterizaj por la esperantistaro; “la Afero” (por kiu la esperantistoj batalas), tiu malfacila engaĝo esprimita per “nova sento”, “interna ideo”, kio el la lingva problemo kondukas al la temaro de egaleco, toleremo, frateco, digno, valoroj kaj respekto de la homa estaĵo, kaj kiun ofte akompanas la epiteto “sankta”, kiel plia atesto de la totala etika engaĝo de la Movado; la “rondo familia”, tiu rondo de gesamideanoj partumantaj la Ideon, kiuj, unuigitaj kiel fratoj, ĵuras kultivi la esperantistan idealon kaj porti ĝin al la mondo, per la agado kie ili estas ofte difinitaj “(kun)batalantoj”.

Al la fratoj, fine, estas speco de framasona kanto laŭ Goethe-stilo, kie estas rimarkeblaj la temoj de la lumo, la opozicio dormo-vekiĝo, la valoro de la “laboro”, la invito al unueco, la engaĝo “por bela espero”: ĉiuj temoj karaj al la framasona idearo.

Laste sed ne fine, oni devas konsideri la aspektojn lingvan kaj simblan. Inter la vortoj de la minimuma baza leksiko de la Fundamento aperas la terminoj *framasono* kaj *loĝio*, tro specifaj por ne esti profunde “internaj” al la zamenhofa vizio. La kvinpinta stelo, krome, kaj la verda koloro ligiĝas al la framasona simbolaro: verdo estas (eĉ pli ol la koloro de la espero) tiu de la transiro, de la transformiĝo, de la mutacio. La stelo,

nomata ankaŭ Pentagramo aŭ Pentalfo, aŭ ankoraŭ Stelo de la mikrokosmo (la kvin pintoj reprezentas la kvar membrojn plus la kapon de la homo, kiu fariĝos “kompleta”, nome inicita, rekta emanaĵo de GADU) estas por la framasonoj simbolo de la homa krea povo surbaze de la ebleco leviĝi el la profana agado al pli kaj pli altaj niveloj de grandeco kaj nobleco.

NOTOJ

¹ Vidu almenaŭ en Astori (2007, 2008).

² Pri la pli ĝenerala klimato en kiu disvolviĝas la zamenhofa penso vidu almenaŭ Astori (2009), el kiu ni reproduktas elтирајojn el la enkonduka parto:

Il programma zamenhofiano di lingua universale, che trovò un *humus* culturale profondo e attivo in tutta l'Europa di fine Ottocento, si presenta molto più articolato e complesso di quanto superficialmente si potrebbe credere; l'idea di uno strumento privilegiato di comunicazione per l'umanità sarebbe dovuto essere, agli occhi del suo inventore, solo il primo passo di una riflessione ben più ambiziosa: l'Esperanto sarebbe stato solo un viatico per il contributo alla creazione, nel mondo di una cultura comune, di un sentire comune, di una comunione d'intenti [...].

Il conflitto più aspro fra culture, tema privilegiato da Zamenhof, si delineava da subito nell'ambito religioso: come una lingua-ponte, pur nella tutela delle native, avrebbe contribuito al miglioramento della comunicazione nel mondo, così una *pontoreligio*, nei medesimi termini dell'Esperanto, avrebbe aiutato il progresso dell'Umanità. [...] L'occidente, sulla scia del libero pensiero settecentesco, già da tempo andava sintetizzando una cultura mondiale di tolleranza, rispetto, fraternità, uguaglianza, libertà, ed è una coincidenza significativa che, nell'altro lato del mondo al di là dell'Atlantico, proprio in quel medesimo anno, Paul Harris ponesse a Chicago le basi del Rotary, quello che sarebbe stato uno fra i più felici esperimenti di internazionalizzazione dell'ultimo secolo. Il progetto esperantista si radicava dunque senza ambiguità in tale tentativo di nuova *koiné* socio-culturale, con un'intuizione geniale di Zamenhof: quale più efficace strumento di una lingua universale si poteva pensare per avviare un discorso più ampio, culturale e religioso? Il progetto sapeva di poter contare su profonde correnti dell'intellettualità europea [...]. In parte dissimulati, agli stessi Esperantisti, origini e ideali dell'Esperanto, fra il dramma di due guerre mondiali e il frenetico evolvere del mondo, questo tentativo di globalizzazione *ante litteram* mostra, in filigrana, una supposta matrice di libero pensiero.

³ La manko de rilataj dokumentoj estas facile klarigebla pro la tiutempaj cirkonstancoj, kvankam estas ĝenerale akceptata la fakto, ke Z. estis adepto de framasonismo: komparu RM (1974) 179; Beretta (1994) Berényi (1995). Vidu ankaŭ Moramarco (1995) 354 kaj sekvaj (ĉapitro rilata al la temo “Framasonismo kaj lingva frateco: framasonaj kontribuoj al la lingvo esperanto”) por pli ĝenerala rilato inter esperanto kaj framasonismo.

⁴ Pri la tekstoj de la Majstro referencu al la OV.

⁵ El Romeo (2000) ni enkonduke resumas tekston por ne-specialistoj:

La *Konstitucioj* de Anderson estas la fundamentaj dokumentoj de la moderna Framasonismo. [...] La ellaboro de la *Konstitucioj* disvolviĝas en la socia kaj politika kadro, kompleksa kaj plena je idealaj fermentoj, kiu antaŭis kaj poste akompanis la fondon de la Granda Loĝio de London en 1717. [...] La *Konstitucioj* de 1723 konkludas la transforman itineron de la “agantaj” loĝioj, tradicie ligitaj al la manlaboro, komencitan eĉ antaŭ 1717; la alprenado de la sistemo de la novaj reguloj sankcias kaj legitimigas la identecon de la nova Institucio, alproprigante al si la postulojn de utopio kaj de nova socialeco kiu, post kelkaj jardekoj, trovos trans la Maniko eĉ pli decidajn subtenantojn. La fondo de la Granda Loĝio de Londono (1717) unue, la alprenado de la *Konstitucioj* (1722-23) poste, malfermas novan fazon en la historio de la Framasonaro. Pere de la Granda Loĝio oficialiĝas la reguleco de la loĝioj al ĝi aniĝintaj; per la difino de la *Devoj* oni precizigas la identecon de la framasono interne kaj ekstere de la framasona kampo. La *Konstitucioj*, finfine, fiksas la regulojn kaj la principojn difinantajn ĉu framasona institucio povas esti konsiderata legitima. Surbaze de tiu konotacio de identeco kaj de la propraj konvinkoj utopiaj kaj klerismaj la Ordeno rapide disvastiĝis Transmanike.

⁶ El *Homaranismo*, 1906: “*La bomaranismo estas celado al pura homeco kaj al absoluta intergenta justeco kaj egaleco. La ideo de homaranismo naskiĝis de la antaŭe ekzistinta ideo de “hilelismo”, de kiu ĝi distingiĝas nur per tio, ke la hilelismo koncernas ĉiujn popolojn kaj religiojn. La bomaranismo estas instruo, kiu, ne deŝirante la bomon de lia natura patrujo, nek de lia lingvo, nek de lia religiano, donas al li la eblon eviti ĉian malverecon kaj kontraŭparolojn en siaj nacia-religiaj principoj kaj komuniĝadi kun homoj de ĉiuj lingvoj kaj religioj sur fundamento neŭtrale-boma, sur principoj de reciproka frateco, egaleco kaj justeco*”. Krome, rilate Hilelison, estas interese substreki kiel la figuro de Hillel, doktoro pri hebraismo (rabeno) vivinta en la tempoj de Herodo la Granda, estas kara ne nur al la kreinto de esperanto sed ankaŭ al Framasonismo, kiu, en la ritoj de unuagrada allaso, referencas al liaj principoj kaj al lia formulo kutime nomata “ora regulo”: Profano, per la fajro konkludiĝis viaj provoj. Povu via koro ekflami pro amo al viaj similuloj: povu tiu Amo, simbolita de la Fajro, stampi viajn vortojn, viajn agojn, vian estonton. Neniam forgesu la ordonon universalan kaj eternan: *Ne faru al la aliaj tion, kion vi ne volus ke oni faru al vi kaj faru al la aliaj la tutan bonon, kiun vi volus ke la aliaj faru al vi* [redakcia kursivigo].

⁷ El www.grandeoriente.it, konsultita en dato 09 06 2009.

⁸ Itallingve vidu en Moramarco (1995) 355; aliaj informoj en Kókény-Bleiber (1933) 451 kaj 536-537.

⁹ Vidu Reinhold (1999) 89 kaj 291.

¹⁰ Ne kompletigita teksto trovita sur la skribotablo de la Majstro, kiel lasta skribo en kajero (probable skizo de artikolo pri la senmorteco de la animo), la fama paĝo *Pri Dio kaj pri senmorteco* citita ankaŭ de Privat (1946) 198-200 (=OV 358) estas trempita en esotera spiriteco.

¹¹ La problemoj kun profunda soci-politika valoro (ekde la demando pri la Eŭropa unuiĝo al la monda paco) nuntempe ĉiam pli nepraj kaj debatataj, estis alfrontitaj de Zamenhof (1911, 1915, 1917, 1918) tra optiko kiu, ankaŭ terminologie, malkaŝas la referencan modelon ĉi tie evidentigitan.

¹² Vidu en Moramarco (1995) 483-489 (ĉapitro titolita “La kredo en la Granda Arkitekto de la Universo”) pri la trajtoj de GADU kaj la paralelo – enhava sed parte ankaŭ forma – kun la malfermaj kaj fermaj vokoj ĉe la laboroj de la Kvargrada Ĉambro en la ritoj de Memphis kaj Misraim.



Riassunto

Della questione relativa al rapporto fra Zamenhof e Libera Muratoria, mancando documenti e prove dirette, poco può affermarsi per certo. Risultano comunque indubbie consonanze della riflessione zamenhofiana con la dottrina massonica, che ben emergono – da un punto di vista contenutistico come pure linguistico e formale – sia dagli scritti socio-politici e religiosi del Majstro sia dalle poesie programmatiche. Fra le pieghe del pra-esperantismo si colgono indizi che confortano l’ipotesi di un legame di Zamenhof con il Libero Pensiero che supera la mera partecipazione a un humus culturale condiviso e diffuso nell’intelligenza europea a cavallo fra XIX e XX secolo, deponendo a favore di una probabile diretta affiliazione del Nostro all’Istituzione.

BIBLIOGRAFIO

- Astori D. (2007): *Le radici filosofiche dell'Esperanto*, Yema Editrice, Modena
- Astori D. (2008): "Pianificazione linguistica e identità" en *Metabasis. Filosofia e comunicazione* (internacia retrevuo pri filosofio: www.metabasis.it) 5, jaro III (majo 2008)
- Astori D. (2009): "Internacia komunikado kaj libera penso: Esperanto inter lingvistika kaj religia planado", eldonata
- Berényi Zs. (1995): "Esperanto kaj framasonismo" en "Boulogne-sur-Mer: Framasona asocio", en *Eventoj*, januaro kaj marto, p. 8.
- Beretta R. (1994): "Macché massone: tutti a Messa con Zamenhof", en *Avvenire*, 3 januaro
- Kökény L. – Bleier V. (1933), en *Enciklopedio de Esperanto*, Budapeŝto [reprezo de 1986 zorgo de Hungara Esperanto-Asocio] - p. 143 'Framasonoj'
- Moramarco M. (1995), en *Nuova Enciclopedia Massonica*, 3 voll., Roma
- Privat E. (1946): *Vivo de Zamenhof*, Herongate, Richmansworth
- Reinhold D. (1999): *Deutsches Freimauer-Lexicon*, Bonn
- RM (1974): "Biografie massoniche", en *Rivista Massonica* 65 [9 n.s.], 3 (marto), pp. 172-186
- Romeo C. (2000): recenzo pri James Anderson, *Le Costituzioni dei Liberi Muratori 1723*, plena eldono zorgo de Giuseppe Lombardo Brenner, Cosenza, 2000, en *Hiram* 2000/3 (diŝite: <http://www.grandeoriente.it/riviste/Hiram/2000/03recensioni.htm>)
- Zamenhof L.L. (1911): "Gentoj kaj Lingvo Internacia", en *La Ondo de Esperanto* 3, pp. 155-156, 175-176
- Zamenhof L.L. (1915): "Post la granda milito – Alvoko al la Diplomatoj", en *The British Esperantist* 11, pp. 51-55
- Zamenhof L.L. (1918): "Projekto de Kongreso pri neŭtrale-homa religio", en *Teknika Revuo* 9 (jan-feb), pp. 8-14 (projekto datita 18 okt. 1914, atinginta la revuon 4 jan 1918)
- OV: Zamenhof L.L. (1929), *Originala Verkaro*, redaktoro Johann Dietterle, Leipzig [reprezo 1983, Oriental-libro, Osaka]